

Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto
123
vintro 2020 / 2021



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

nia federacio sur Facebook

<http://www.facebook.com/esperantoprovence>

prezidanto

Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

aliĝkoto (kun la gazeto)

6 €

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Nicole Lafitte
(ĉe la supra adreso de
Pierre Oliva)

sekretario

redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain
48 avenue Alexis Godillot
83400 Hyères
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n° 25-a de marto 2021

bonvolu sendi al la supra retadreso

><><

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

Vorto de la Prezidanto

Por la unua fojo en mia longa asocia vivo, mi renkontis viruson, kiu ne ebligis daŭrigi diversajn aktivecojn.

Kia trista situacio!

Pro tio, mi ŝatus gratuli ĉiujn samideanojn, kiuj sukcesis pluivigi nian lingvon, ĉu per sia telefono ĉu per la reto.

Atentu pri vi, ĉar la epidemio bedaŭrinde daŭras plu.

Esperante baldaŭan finon de la virusaĉo, mi esprimas al vi ĉiuj miajn plej korajn bondezirojn por la komenciĝanta jaro 2021.

Pierre Oliva



enhavo

2	jarraportoj	6	Esperanto-festo bonaj novaĵoj
4	nekrologo	7	Esperantistoj vizitas nian regionon
5	ĉiuj enskatoligitaj	8	omaĝo al H. Gente agendo
		+	reta suplemento pri Reunio

Ne forgesu pagi la aliĝkotizon por la jaro 2021 - 6 € - al Espéranto-Provence

ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasisto, Nicole Lafitte
(aliĝilo aldonita al ĉi tiu gazeto)

Dankon!

N'oubliez pas de payer la cotisation pour 2021 - 6 € - à Espéranto-Provence

soit par l'intermédiaire de votre groupe local, soit directement à notre trésorière, Nicole Lafitte
(bulletin d'adhésion joint à ce journal)

Merci !

Federacia agado

Federacia membro-kunveno / Assemblée générale de la fédération

Pro la nuna sankrizo, ni ankoraŭ ne povas sciigi al vi daton kaj lokon.

Ni informos vin, kiam eblos.

En raison de la crise sanitaire actuelle, nous ne pouvons pas encore vous indiquer une date et un lieu.

Nous vous informerons au plus vite.

Bonvolu legi la sekvajn moralan, agadan kaj finanĉan raportojn por la jaro 2020.

La kunvokilon kaj voĉdonan rajtigilon (en okazo de via neĉeesto) vi ricevos poste.

Veillez prendre connaissance des rapports moral, d'activité et financier pour l'année 2020.

Vous recevrez plus tard la convocation et le pouvoir (pour le cas où vous ne seriez pas présent).

1 - Morala raporto

Pierre Oliva

Estas triste kiam oni devas skribi moralan raporton de asocio kiu, dum preskaŭ la tuta jaro, ne povis normale funkcii.

Kelkaj kluboj sukcesis vivi nian lingvon per retaj kontaktoj kaj eventoj, aŭ per telefonaj kursoj.

Eĉ okazis, ke kelkaj el vi regule kontaktis la membrojn de sia asocio por havi novaĵojn aŭ ankaŭ por rompi

ies eblan izolecon.

Feliĉe, ni povis plu dissendi nian gazeton kaj kelkaj el vi partoprenis en forumoj de asocioj en septembro.

Esperable, ni rapide forgesu la jaron 2020!

Gratulon kaj dankon al ĉiuj, kiuj emis kaj kapablis ion fari.

2 - Agadraporto

Pascal Vilain

1 - Membraro

Je la 31a de decembro 2020, Espéranto-Provence havis 82 membrojn (3+).

2 – Asocioj, grupoj kaj individuaj membroj

2-1 deklaratitaj asocioj

- kiuj plu ekzistas kaj aktivis

05 - Espéranto-Gap: 1 membro

13 - Espéranto-Marseille: 14 membroj

ttt-ejo : <http://esperanto.marseille.over-blog.com>

83 - Espéranto-Club Fréjus-Saint-Raphaël: 18 membroj

83 - Espéranto—Le Beausset: 8 membroj

84 -Avignon - K.E.C.A. (Kultura Esperanto-Centro de Avinjono): 3 federaciaj membroj

- kiuj plu ekzistas administracie sed ne aktivis

04 - Manosque - (Esperanta Kulturo en Manosque): 3 federaciaj membroj

13 - La Roque-d'Anthéron : Espéranto-La Roque

13 - Miramas : G.E.M. (Groupe Espéranto Miramas)

2-2 antenaj grupoj de Espéranto-Provence

13 - La Ciotat (2 federaciaj membroj)

83 - Hyères (5 federaciaj membroj)

3 – Administro

estraranoj (3) :

prezidanto: Pierre Oliva

sekretario: Pascal Vilain

kasisto: Nicole Lafitte

aliaj komitatanoj (5):

Monique Arnaud, Marc Gallardo, Thierry Spanjaard, Renée Triolle, Gilles Wallez

gazetrespondeculo: Pascal Vilain

retejrespondeculo: Thierry Spanjaard, Pascal Vilain

representanto de nia federacio ĉe Espéranto-France:
Pascal Vilain (anstataŭantino : Renée Triolle)

membrokunveno:

Ĝi okazis en Les Issambres (83) la 1an de marto, okaze de la Mediteranea Esperanto-Semajno.

21 partoprenantoj + 8 senditaj rajtigiloj

komitatkunsidoj:

> marto 1 : Les Issambres (post la membrokunveno)

> aliaj prokrastitaj pro la sankrizo

4 – Instruado

- kursoj

> en la kluboj de Saint-Raphaël, Le Beausset, La Ciotat, Marseille, Avignon,

- staĝoj

> februaro 29 / marto 7 - Les Issambres (83):

Mediteranea Esperanto-Semajno

> decembro 1/2 - Le Beausset (83):

Kultura Semajnfino > nuligita

- ekzamenoj

> septembro 19 – Le Beausset : FEI-ekzamenoj (1a kaj 2a gradoj); tri kandidatoj, ĉiuj sukcesis

5 – Informado – komunikado

> kiam eblis ĉijare, disdonado de Le Monde de l'espéranto (Renée Triolle en La Ciotat kaj Marseille, Rosy Inaudi en sia regiono, Pascal Vilain en Hyères)

> kiam eblis ĉijare, en Marseille (Brasserie les Danaïdes, 4 square Stalingrad, 13001 Marseille), la 1an jaŭdon de ĉiu monato: Lingva kafejo

> kiam eblis ĉijare, en Hyères (Hotelo Ibis-Gare), la lastan merkredon de ĉiu monato: Lingva kafejo

> septembro – Gap, La Ciotat, Marseille, Le Beausset, Saint-Raphaël: «Forumo de la asocioj»

6 - klubaj eventoj

> januaro 7 - Marseille: reĝkuka festeto

> januaro 15 - La Ciotat: reĝkuka festo + membrokunveno

> januaro 25 - Saint-Raphaël: reĝkuka festo + membrokunveno

> februaro 8 - Le Beausset: oficiala disdono de diplomoj al 4 ekzamenitoj de la FEI-ekzamenoj

> junio 28 - Les Arcs-sur-Argens: pikniko de la klubo Fréjus-Saint-Raphaël

> februaro 25 - Marseille: prelego en «CIRA» de tri rusinoj pri «Volgogrado»

> septembro 10 - Marseille: prelego en «Cité des associations» de Floréal Martorell, pri Vinilkosmo

7 – movadaj eventoj

> junio 20 / septembro 20: Mondafest' 2020: reta festivalo de Esperanto en kiu partoprenis pluraj Provencanoj.

> julio 4 – Sainte-Enimie (48): Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva partoprenis en la Ĝenerala Kunveno de la asocio «Espéranto-Info».

> julio 27 / aŭgusto 1 - Kastelo Greziljono: 1a Verda Naturisma Semajno, organizita de La Kulturdomo kaj INOE - partoprenis pluraj membroj de Espéranto-Provence; prelegis Rosy Inaudi kaj Thierry Spanjaard.

> aŭgusto 1-8: Virtuala Kongreso de Esperanto; partoprenis pluraj Provencanoj; per receptoj el Reunio partoprenis Maggy kaj Philippe Combot en la virtuala bankedo.

> septembro 12-13 – Parizo: komitatkunsido kaj Ĝenerala membro-kunveno de Espéranto-France; partoprenis Pascal Vilain; Eric Streichemberger, membro de nia federacio, estis elektita kiel estrarano de nia landa asocio.

> decembro 12: Reta Esperanto-Festo organizita de Espéranto-France; partoprenis Monique Arnaud, Thierry Spanjaard kaj Pascal Vilain

> dum la tuta jaro: Nicole Lafitte kaj Pascal Vilain partoprenis en verkateliero iniciatita de A. Löwenstein

> dum la tuta jaro: Jean-François Cousineau estis korektanto de la revuo Espéranto-Info.

8 – kulturaj kaj alispecaj eventoj

> januaro 27 - Les Pennes-Mirabeau, en Collège Monod: prezentado de plurmonata laboro pri «genocido kaj diskriminacioj» - laborgrupo pri antaŭjuĝoj parolis pri Esperanto.

> februaro 22 - La Ciotat: Internacia Tago de la Gepatra Lingvo


9 – diversaĵoj

> julio/septembro: Alain Rémy bicikle vojaĝis tra Eŭropo.

10 – venontaj okazaĵoj

> Les Issambres: Mediteranea Esperanto-Semajno > nuligita

> novembro aŭ decembro 2021 - Kultura Semajnfino en Le Beausset: datoj, kursoj kaj distra programo decidotaj



masko estas utila ilo !

3 - Financa raporto

Nicole Lafitte

bilan financier 2020			
recettes		dépenses	
cotisations	318,00	gazette (impression et envoi)	304,00
reversement cotisations <u>Esp-France</u>	200,00	examens <u>FEI</u>	97,00
dons	131,00	investissements	
agios	1,00	(stage <u>Beausset</u>	14,00
stage Le <u>Beausset</u> année 2019	58,00	et <u>Barnum</u>)	99,00
		La Poste	8,00
		excédent au 31/12/2020	186,00
total	708,00	total	708,00
solde au 31/12/2020 : compte courant : 1726,46 € ; livret épargne : 4622,21 €			
la trésorière: <u>Nicole Lafitte</u> ; le président : <u>Pierre Oliva</u>			

Malgajiga novaĵo

Ni ege malĝojas anonci la forpason de Laurent Autard, kiu elektis forlasi la vivon la 7an de oktobro 2020. Lia entombigo okazis sabaton la 10an en la tombejo de Pourrières.

Laurent estis longtempa naturisto kaj Esperantisto jam de kelkaj jaroj, instruis Esperanton kaj multe faris por disvastigi nian lingvon.

Ni konservas memoron pri liaj bonkoreco, humileco, inteligenteco, subtileco kaj grandega kulturo.

Niaj elkoraj pensoj kaj nia subteno iras al Lidia, lia kunulino, kaj al lia parenaro.

(inf. Thierry Spanjaard)



Thierry Spanjaard

Ĉiuj enskatoligitaj! Ĉu retkolibroĵoj efike luktas kontraŭ Zumlaceco?

Jam de pluraj monatoj, ĉiu inter ni devas suferi la mankon de homaj rilatoj. Fakte, iom post iom, ni adaptiĝis kaj daŭre adaptiĝas al la situacio kaŭzita de la trudizoliĝo.

Dum la unua trudizoliĝo, komencita en marto 2020, mi same kiel multaj amikoj unue sentis konsternon. Ĉio en nia vivo haltis kaj ni devis trovi novajn manierojn labori, vivi kaj havi liberan tempon. Fakte ni ĉiuj havis ege pli da libera tempo ol antaŭe: ĉiuj rilatoj kun amikoj kaj diversaj tipoj de konatuloj tuj ĉesis. Ekde tiu momento, kelkaj provis transloki en sian personan vivon tion, kion ili jam spertis en profesia medio: la virtuala kunveno.

Dum la lasta printempo, ĉefe dum la trudizoliĝo de marto ĝis majo, ni spertis pli kaj pli da entrudiĝo de teknikaj rimedoj en ĉiujn partojn de nia vivo. Mi laboras sole kaj hejme jam de pluraj jaroj kaj jam estis alkutimiĝinta al retaj kunvenoj, ofte per GoToMeeting aŭ per Webex. Mi jam ankaŭ havis vidinteragojn per Skype aŭ per WhatsApp. Kaŭze de la trudizoliĝo, ni ĉiuj serĉis kiel efike vide interagi kun aliuloj. La ĉefa celo estis konservi kontakton kun familianoj, amikoj kaj diversaj konatuloj, ekzemple kun niaj Esperantaj grupoj. Ni provis diversajn ilojn: Facetime, WhatsApp, Skype, Jitsi, Kaj multaj fine uzis Zoom, Google Meet aŭ Microsoft Teams.



Unu el la efikoj de la sankrizo estas la plialtiĝo de la teknika nivelo de multaj homoj. Ĉar simplaj fizikaj naturaj interagoj ne plu eblas, multaj homoj, kiuj ne kutimis interagi per komputilo, ekuzis tiujn ilojn kaj nun sufiĉe bone regas ilin. Nun, Zumkunvenoj iĝas parto de nia ĉiutaga vivo. Ni starigas ilin por multe da diversaj celoj: vidi familianojn sendepende de ilia vivloko, ĉu proksima ĉu sur alia kontinento, doni kursojn, diskuti kun amikoj pri diversaj temoj, sekvi prelegojn kaj debatojn, havi aperitivan, sekvi nudajn jogkursojn, debati kadre de diversaj asocioj, ktp.

Mi pli kaj pli alkutimiĝas interagi nur kun enskatoligitaj vizaĝoj.

vizaĝoj de anoj de nia federacio, eĉ tiu de Flavie el Miami!, en la skatola komputila ekrano de Thierry



En Esperantujo, se oni uzas «[Eventan Servon](#)», la retejon, kiu listigas multajn Esperantajn eventojn tutmonde, oni ofte vidas ĉirkaŭ dek retkunvenojn tage. La afero iĝas tiel kutima por ĉiuj, ke JoMo nun kantas "Ĉu vi volas Skajpi?" anstataŭ sia kutima "Ĉu vi volas danci?"

Tiel granda propono de oportunejoj interagi kun aliuloj ŝanĝis kelkajn esperantistojn en retkolibrojn! Same kiel la kolibroĵoj, ili konstante kaj rapide flugas kaj flugas inter diversaj retkunvenoj. Ili estas tiel okupataj inter abundaj retkunvenoj, ke ili partoprenas en ili dum nur kelkaj minutoj, adaptas siajn kameraon kaj mikrofonon, salutas aliajn retkolibrojn, kiujn ili jam renkontis en diversaj kunvenoj pli frue dum la sama tago, kaj tuj foriras: ili volas tuj flugi al alia retkunveno!

Aliflanke, multaj homoj nun suferas pri Zumlaceco. Tiu malsano estas bone dokumentita, ĉefe de usonanoj. Retkunvenoj estas lacigaj, ĉar oni devas esti ege pli koncentrita sur la bildoj kaj la sono ol kiam oni reale renkontas homojn. Krome, dum normalaj konversacioj, oni multe komprenas per la korpolingvo eĉ sen rimarki ĝin. Sur ekrano, oni vidas nur la vizaĝon, kaj ofte eĉ ne bone! Oni devas esti ege pli atentema por sekvi konversacion per retaj iloj. Kroma premo estas, ke per tiuj iloj, ni konstante vidas nin mem kaj pro tio zorgas pri niaj propraj vizaĝoj kaj aspekto. Tiuj interagoj estas pezaj por niaj cerbaj rimedoj.

Fakte la retkunvenoj helpas nin travivi izoliĝan periodon. Sed la risko sperti Zumlacecon pligrandiĝas...

Pascal Vilain

Esperanto-Festo anstataŭ Zamenhof-festoj

Ĉar la sankrizo malebligis ĉijaran organizadon de diversurbaj Zamenhof-festoj, Espéranto-France kaj ĝia novelektita prezidanto Bruno Flochon havis la bonan ideon proponi anstataŭan Esperanto-Feston per Zum. Ĝi okazis sabaton la 12an de decembro, de la 17a ĝis la 19a. En ĉeesto de pli ol 100 spektantoj, dudek kontribuantoj parolis pri regionaj eventoj, prezentis sian regionon, recenzis legindajn verkojn, kantis, ktp. Koncerne nian federacion, Monique Arnaud prezentis la libron: «Les langues, un jeu d'enfant!», la novan verkon de Greta Franclét (kiu cetere eklernas nian lingvon kaj bele deklamis poemon). Thierry Spanjaard parolis pri Esperanto en Marsejlo kaj ankaŭ pri la intaj

kaj ontaj agadoj en Francio de INOE, la asocio de la Esperantistaj naturistoj. Kaj mi iom parolis pri niaj regiono kaj federacio.

Espéranto-France jam anoncis, ke ĝi verŝajne proponos saman eventon en decembro 2021, sendepende de plua aŭ espereble finiĝinta pandemia situacio.



jes ja... enskatoligitaj,
kiel skribis Thierry...

Nicole Lafitte

Kelkaj bonaj novaĵoj

La ĝenerala etoso estas malgaja pro la pandemio. Tamen, ni notu kelkajn «sunradiojn», nekonatigitajn aŭ nur iomete menciitajn de la amasinformiloj.

Mesaĝo de Hori Jaŝuo el Japanio

Multaj el ni konas Hori Jasuo-n.

Kiam okazis la atomkatastrofo en la nuklea centralo Fukuŝima 1 en Okuma (Gubernio Fukuŝima), komencinta ĉefe pro cunamo post la tertremo de Tōhoku je la 11a de marto 2011, ĉiun tagon Hori rete informis nin. Li daŭrigis tion la tutan jaron, eĉ poste.

Li vizitis nin en Francio, interalie en Provenco, por atesti pri tio. En la UEA-kongreso de Lilo en 2015, li prezentis sian albumon «Fotoj kaj poemoj - memoroj pri la Japana Katastrofo».

Jen lia mesaĝo:

“Karaj, mi sendas raporton pri esperantistino, s-ino Oŝioka Taeko, kiu sola kolektis pli ol 100 000 subskribojn kontraŭ nukleaj armiloj. Mi estas tre fiera, ke ni havas tiun laŭdindegan virinon en Esperantujo.”



Memorfoto de la 111 000a subskribo,
la 3an de decembro 2020.
Malantaŭe vidiĝas la riparata
Atombombita Kupolo.

Traktato pri abolo de nukleaj armiloj

La 24an de oktobro, Honduro anoncis al la Unuiĝintaj Nacioj, ke ĝi ratifis la Traktaton pri Abolo de Nukleaj Armiloj. Tiu ĉi traktato estis adoptita de 122 landoj en la UN en julio 2017, kaj nun ĝi gajnis la ratifon de 50 landoj en la mondo por ekfunkcii. Ĝi enhavas malpermeson pri uzado de nukleaj armiloj, minacado per ili, produktado, posedado, eksperimentado, stokado ktp. kaj en ĝia antaŭparolo estas menciita ke, por ke nukleaj armiloj neniam plu estu uzataj, ilia tuta forĵeto estas necesa.

La traktato ekfunkcios la 22an de januaro 2021.

Rimarkoj: Ankaŭ Francio devos, laŭleĝe, ratifi ĉi tiun traktaton.

Ĉiujare la franca nuklea armilo kostas al ni 4,55 miliardojn da eŭroj, kiuj ebligis aĉeti 100 000 litojn por gravegaj sanzorgoj, 10 000 spiraparatojn, kaj dungi pliajn 20 000 flegistojn kaj 10 000 kuracistojn.

Esperanto en la retejo Duolingo

Tiu populara apo, kiu ebligas lerni multajn lingvojn senpage, proponis ekde 2015 lernadon de Esperanto por anglalingvanoj.

Feliĉe, dank' al la laborado de Axel Rousseau kaj Emmanuelle Richard, en julio 2020 estis lanĉita franc-lingva versio de la kurso.

Lastjare, 770 000 uzantoj de Duolingo tiel praktikis Esperanton.

Ĉu ne estas bonaj novaĵoj?

Esperantistoj el alia landoparto vizitas nian regionon...

ndlr: Pri la sama okazaĵo, ĉefe pri la prelega parto de Flo pri Vinilkoso, jam aperis raporto de Liliane Alazraki en la antaŭa numero 122, je paĝo 4a. Mi aldonas ĉi tiun tekston de Françoise, ĉar ĝi raportas ankaŭ pri turisma flanko.

Françoise Eriksen

Flo (*ndlr: Floréal Martorell*) kaj mi vojaĝis kelkajn tagojn ĉe la marbordo de la sudfrancia departemento «Var», en la naturisma insulo «Le Levant», kiun ni tre ŝatas kaj en la monto de la Kabo «Sicié», sudokcidente de Tulono. Ĉi tiu regiono ebligas al ni marŝi sur marbordaj padoj por atingi belajn kvietajn golfetojn, praktiki naturismon kaj subakvajn ekskursojn.



Levant



Kabo Sicié

Flo estis invitita por fari prezenton por la membroj de la Esperanto-asocio de Marsejlo, pri muziko en Esperanto kaj [EUROKKA-Vinilkosmo](#).

Thierry Spanjaard estas la prezidanto kaj ankaŭ tiu de [INOE](#) (Internacia Naturista Organizo Esperantista).

En tiu kadro, li profitis nian viziton al Marsejlo por organizi nudan ekskurson en la Parko de la Krekoj de Marsejlo, (Le Parc des Calanques de Marseille) kun membroj de ANP (Association Naturiste Phocéenne).



Dum Flo prelegas, Thierry la fotanto estas mem fotita.

Merkrede la 9an de septembro, je la 9h00, ni foriris por surgrimpi la imponajn klifojn, kiuj tre proksime leviĝas super la urbo norde, kaj la maro sude.

La vetero estis iomete malcerta kun pluva risko, sed la nuda ekskurso estis konservita.

La avantaĝo estas ke ne estis tro varmege, sed Bruno, la organizanto de la ekskurso, kontrolis ke ni prenis sufiĉe da akvo. Ni devis atingi la krekon de Podestat tra la Belvidejo de «Titou Ninou» kaj reveni farante bukilon. Ni foriris vestitaj sed post kelkaj minutoj, ĉar neniu ĉe horizonto, ni daŭrigis nudaj, kun niaj dorso-sakoj kaj nur jupeto rapide surmetebla. Dum la unua paŭzo, ni povis de supre ĝui la vidon al Marsejlo.

Post tri horoj, ni atingis la krekon de Podestat kaj ni multe ŝatis la freŝan sed merititan banon. Dum la reveno, la marborda pado ofertis mirindajn kaj impresajn vidpunktojn fronte al la insulo de Frioul kaj al la marklifo.

Post kelkaj pasejoj kun etaj grimpadoj, supren kaj malsupren, ni atingis la deirpunkton situantan en parkejo de suda distrikto de Marsejlo. Surprizis nin, ke ni povis fari nudan ekskurson, en sovaĝa loko tiom proksime al la urbocentro.



jen Flo

Ĝi estis bonega sperto, sporta, teknika, amika kaj mojosa, kun naturistaj aktivistoj. Ni ŝatus refari ĝin, ĉiam bone surŝuitaj kaj por ĉiu, minimume du litroj da trinkebla akvo!

Esti nuda, en harmonio kun la naturo, kun la aliaj, respektante iliajn diferencojn, estas valoro kiun ni defendas, same kiel praktiki esperanton, por la respekto de la diverseco kaj libereco de la popoloj, ties lingvoj kaj kulturoj por ilia vivo en paco.

Omaĝe al Hélène Gente

Roselyne Favier

Dum la festoj post la Liberigo, en 1944, Heleno kaj multaj aliaj personoj festis tion kun Sinjoro Lentaigne, kiu lernigis ilin pri la Freinet metodo en Balaruc. S-ro Lentaigne estis ankaŭ esperantisto, kaj kompreneble, konigis tion.

Poste, Heleno konatigis Esperanton al Andreo, kiu baldaŭ fariĝis ŝia edzo... Rapide, geinstruistoj ili estis. Post la horoj de la lernejoj kursoj, ili lernigis Esperanton al pluraj lernantoj.

ICEM (koopera instituto de moderna lernejo), al kiu ili apartenis, multe laboris por Esperanto.

Hejme, ili akceptis plurfoje jare esperantistojn, kiuj alvenis de ĉie en la mondo. Heleno kaj Andreo vojaĝis dank' al Esperanto, partoprenis en naciaj kaj internaciaj kongresoj. Andreo multe tradukis verkojn, helpe de Heleno. Kursojn ili donis dum pluraj jaroj en la avinjona MJC (domo por la junuloj kaj kulturo). Almenaŭ tri fojojn ili vizitis la Greziljono-kastelon, kiam ĝi ankoraŭ ne estis la sufiĉe komforta domo, kiun oni konas hodiaŭ...



À noter sur votre agenda

Dans les n^{os} 121 et 122, il était écrit ici-même que la crise sanitaire était toujours d'actualité et qu'il ne fallait pas écarter la possibilité d'une nouvelle vague d'attaque virale accompagnée d'une nouvelle période de confinement. Eh bien rien n'a changé, nous en sommes toujours là, et les dates indiquées ci-dessous ne le sont toujours qu'à titre indicatif.

dans notre fédération

les 1^{er} et 3^{ème} jeudis de chaque mois, jusqu'à réouverture des bars: réunion par Zoom proposée par Espéranto-Marseille

infos : <http://esperanto.marseille.over-blog.com>

(quand les cafés seront ouverts)

1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille

Café linguistique - Brasserie Les Danaïdes

4 square Stalingrad, 13001 Marseille

dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères

Café linguistique - bar de l'hôtel Ibis-Gare

45 rue Edith Cavell (face à la gare)

février / mars - Les Issambres

MES (Méditerranée Esperanto-Semajno)

a dû être annulée

Ĉefe, Heleno ŝatis kantojn, ŝi ŝategis la Esperantajn kantojn kaj kantigis aliulojn kune kun ŝi. Kaj eĉ, multe pli malfrue, en la emeritejo, kie mi vizitis ŝin, ŝi ankoraŭ kantigis min Esperante!

La forpaso de
Hélène Gente,
okazinta la
17an de novembro
2019,
estis anoncita
en la n^o 119
de nia gazeto.



Renée Triolle

Pli kaj pli ofte, nun, mortas eminentaj Esperantistoj, kiuj gvidis nian alvenon al Esperantujo.

Kvankam Heleno, ofte tre humile, restis malantaŭ la edzo, ŝi multe kontribuis al la loka vivo.

Mi memoras, kiel kun Andreo ili puŝis kaj helpis filmon pri Freinet, kiun ili konis persone.

en France

pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs pour savoir si la programmation est maintenue.

Baugé (49) - Château de Grésillon

en avril et en mai : 10e PRINTEMPaS + rencontre

chorale d'Interkant + Congrès de SAT-Amikaro

juillet 3-9 : 1er festival Naturist' + Semaine Verte de Naturisme (FFN + INOE)

<http://gresillon.org/?lang=fr>

Bouresse (86) - Kvinpetalo

<http://www.kvinpetalo.org/?lang=fr>

mai 13-16 - Trélissac (24) : Congrès et assemblée générale d'Espéranto-France.

en Europe

juillet 17-24 - Belfast (Irlande du Nord) :

106e congrès international d'UEA

<https://uea.org/kongresoj>

Birdoj en Reunio

La multeco de la birdoj mirigas la alvenantojn. Jen kelkaj plej vidataj specioj.

Reunia turteto (la tourterelle péi, *geopelia striata*)

Ĝi estas preskaŭ duone pli malgranda ol la turto, kiu vivas en Eŭropo. Ĉie kaj tuttage rukulas tiu kolombo-simila birdo. Ŝajnas, ke la homoj ne plu aŭdas ĝin !

[Vi povas ĉi tie aŭskulti la kveradon de tiu birdo.](#)



Piknonoto (le merle Maurice, bulbul orphée, *pycnonotus jocosus*)

La piknonoto havas hupon kaj laŭte, melodie kantas. Sed, malgraŭ tiuj belaĵoj, ĝi estas invadema birdo, kiu estas detruanta multajn ĉitieajn speciojn. Ĝi venas de Hindio : oni rakontas, ke ĝi elfuĝis el sia kaĝo en 1970 kaj de tiam prospere vivas en Reunio.

Ruĝa foŭdio (le cardinal, *foudia madagascariensis*)

La masklo de tiu specio estas vigle ruĝa de septembro al majo. Oni ofte vidas ĝian tre ruĝan makulon, kiu flugas de branĉo al branĉo.



Reunia saksikolo (le tec-tec, *saxicola tectes*)

La saksikolo estas sentima kaj scivola birdeto, kiu ofte akompanas la promenantojn. Ĝi deziras partopreni la piknikojn kaj eĉ povas stari sur la ŝuoj de siestanto !

Ploceo* (le bellier, le tisserin gendarme, *ploceus cucullatus spilonotus*)

Tiu flava birdo fabrikas pendantan neston, en kiun ĝi eniras de malsupre. La ploceoj grege vivas : multaj nestoj pendas de unu arbo aŭ kelkaj proksimaj arboj. La masklo fabrikas neston, kiun li prezentas al la ino. Se la nesto ne plaĉas al la ino, la masklo detruas la neston (oni trovas multajn nestojn piede de la arboj) kaj devas refari alian.



Faetono* (le paille-en-queue, *phaeton lepturus*)

La faetono estas bela, blanka mara birdo, kiu elegante flugas super la maro aŭ laŭ la klifoj, kie ĝi nestas. La homoj en Reunio ofte uzas ĝin kiel emblemon.

Botaŭro (le butor, *butorides striata rutenbergi*)

La botaŭro estas malgranda ardeo. Ĝi uzas tre inteligentan teknikon por kapti fiŝojn. Ĝi tenas en sia longa beko logaĵon. Kiam alproksimiĝas fiŝoj, ĝi delikate metas la logaĵon sur la akvon. Fiŝo volas manĝi la logaĵon, sed tuj la botaŭro kaptas la fiŝon. Ni ofte vidas tiun botaŭron en apuda parko en Saint-Denis. Ĝi ne timas la homojn, kiuj fotadas ĝin.



Reunia cirkuo (le papangue, *circus maillardi*)

Tiu cirkuo estas granda rabobirdo, kiun oni ofte vidas ronde fluganta super la pejzaĝoj.



Petrelo de Barau (le pétrel de Barau, *pterodroma barau*)

Tiu birdo bedaŭrinde havas malfeliĉan sorton pro la homoj. Kiam ĝi naskiĝas en la montoj, ĝi volas flugi al la maro, ĉar li estas mara birdo. Sed kie estas la maro ? Ĝi estas, kie rebrilas la steloj en la akvo. Ĝi do flugas al la malsupraj lumoj. Sed tiuj lumoj ne estas la steloj sur la maro, ili estas la lumoj de la stratlanternoj, de la domoj, de la aŭtoj. La birdo serĉas la akvon de la maro por naĝi kaj vivi, sed trovas la betonon de la trotuaroj kaj la gudronon de la stratoj. La katoj kaj la ratoj atakas tiujn senpovajn idojn, kaj baldaŭ estos la fino de tiu specio. Kelkaj urboj decidis malŝalti la lanternojn en kelkaj stratoj. Ĉu sufiĉos?

Dodo (le dodo, *raphus cucullatus*)

Tiu birdo ne plu ekzistas, sed ĝi estas kvazaŭ emblemo de Reunio : oni interalie vidas ĝin sur boteletoj de biero, ĉar Dodo estas marko de ĉitiea biero. Tiu birdo malaperis, tuj kiam la homoj venis sur tiun insulon en la 16-a jarcento. Ĝi estis granda, malrapida birdo, kiu trankvile nestis sur la tero. La homoj, la hundoj kaj la ratoj detruis la tutan specion.



Tio signifas: la biero Dodo estas en ĉi-tiu drinkejo!

La birdoj de Reunio kaj ni mem deziras al vi plej bonan kaj sanan novan jaron 2021 !